

# Martí kaj la sciencoj

---



José Martí estas konata kiel elstara patrioto kaj revoluciulo, naskiĝinta en Havano la 28-an de januaro 1853. Estante tre juna, nur 16-jara, li komencis esprimi siajn sociajn, patriajn kaj sendependigajn idealojn, kio kondukis lin al malliberejo.

En 1875 li estis forpelita al Hispanio, en kies ĉefurbo li publikigis eseon nomatan “La política malliberejo en Kubo”, kiu konsistigas fundamentitan kaj viran denuncon pri la abomenindaĵoj de la kolonia reĝimo.

Kiel ĵurnalisto José Martí plenumis socian rolon en la disvastigo de kulturo, etiko, scienco, teknologio kaj pluraj aliaj temoj. Li estis homo de universala kulturo kaj vivante en jarcento de multaj transformoj en la kampo teknologia, li ne povis esti for de tiu influo.

En sia verka laboro por diversaj gazetoj de Meksiko kaj aliaj amerikaj landoj, Martí senlace agis diskonigante la sciencan evoluon. El la plumo de Martí oni povas legi, kune kun profundaj artikoloj pri arto, pentrado kaj aliaj temoj, ankaŭ riĉajn analizojn pri novaj malkovroj, sciencaj libroj aŭ teorioj.

Li verkis artikolojn pri biologio, geologio, medicino, mekaniko farante akutajn recenzojn pri preskaŭ ĉio rilata al la teknologia horizonto de sia epoko. Eĉ kiam li verkis la konatan infanlibron “La ora aĵo”, li parolis pri teknikaj temoj kiel ekzemple “La historio pri kulero kaj forko.”

Por Martí devas ekzisti simbiozo inter kulturo kaj scienco, ĉar “nenio sugestas tioman kaj tiom belan literaturon kiel scienca paragrafo”.

José Martí interesiĝis pri vasta temaro. Lia unua artikolo pri scienco aperis la 2-an de julio 1875. Ekde tiu momento li plurfoje verkis kaj parolis pri tiaj temoj kiel konstatablas en diversaj artikoloj kaj oratoraj oĵoj.

Oni ne povas forgesi ke li vivis en Nov-Jorko, urbo kiu tiam travivis grandan evoluon en diversaj agadkampoj.

Meze de la preplaboroj por la sendependiga milito de Kubo, Martí neniam perdis la intereson pri scienca literaturo, kiun li ofte rekomendis al amikoj kaj amatoj.

---

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/20447-marti-kaj-la-sciencoj>



**Radio Habana Cuba**